

## ILEI raportas

### Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2018-01-15 ĝis 2018-04-15.

#### Vivo de la Ligo Eventoj

Januare okazis diskuto ene de la Estraro pri novaj **Honoraj Membroj de ILEI**. De la sekcioj ne venis proponoj antaŭ la 31-a de marto. Julie du valoraj aktivuloj estos proponitaj de la Estraro al la Komitato por fina decido. Laŭ kutimo elektiĝas 0, 1 aŭ 2 personoj jare, ne pli. Pri tiu aspekto nenio legeblas en la Regularo de ILEI pri Honoraj Membroj.

Januare la Prezidantino Mireille Grosjean kontrolis kaj reviziis la **aliĝilon** por membriĝi al ILEI.

La nova esplorkonkurso por gajni la **Premion Mauro La Torre** startis. Fine de februaro jam alvenis laboraĵo por la konkurso. La Prezidantino trovis fakajn ĵurianojn inter eminentaj esperantistoj. Decido okazos en junio kaj rezulto anonciĝos en julio.

Februare-marte estis korektita kaj diskutita ene de la Estraro la **buĝeto** por 2018. Fine de marto la korektita buĝeto estis proponita al la Komitato por reta voĉdono, kiu survojas.

La Prezidantino sendis **salutvortojn** al la partoprenontoj de la ĉina nacia kongreso en januaro, de la kongreso de Tut-Amerika Kongreso de Esperanto TAKE en Kubo en februaro kaj de la nacia kongreso de Burundo en marto.

Okaze de sia partopreno en la 11-a Mezorianta Kongreso en Marakesho, **Maroko**, Mireille Grosjean havis diversajn promesplenajn kontaktojn kaj kun kunkongresanoj kaj kun lokaj fakuloj. ILEI klopodas nun krei fruktodonan kunlaboron.

Februare Mireille Grosjean sendis tra diversaj kanaloj kaj ankaŭ tiuj de ILEI alvokon por helpi al interesa iniciato en sia apuda administra centro (kantona ĉefurbo) Neuchâtel, kie septembre okazos **festivalo pri kultura diverseco**. Temas pri granda statuo, sur kiu en longa metala rubando aperos la sama frazo en diversaj lingvoj: “Ŝajnas al mi, ke per la multobligo de la lingvoj la horizontoj multobliĝas”. La aŭtoro de la frazo estas Erri de Luca, itala poeto, tradukisto kaj montgrimpano. Jam venis pli ol 40 tradukoj de niaj samideanoj-ILEI-anoj. Post la festivalo la statuo staros en publika parko, botanika ĝardeno.

#### Kapablo

**EIT** – Esperanto-Instruista Trejnado: evoluo de la programoj.

La programo Reta Instruista Trejnado de Esperanto (RITE) kaj Madrido proponas 24 lokojn. La programo RITE kaj Kotonuo proponas 20 lokojn.

Fine de februaro aperis Gazetara Komuniko de UEA kun alvoko de Mireille Grosjean aliĝi al tiuj programoj de EIT.

Al perreta studado kun fino en Madrido kun partopreno en la seminario, ekzamensio kaj kun prezento de provleciono dum la ILEI-Kongreso aliĝis 10

personoj. Al perreta studado ĝis novembro-2018 kun fina partopreno en Kotonuo en seminario, en ekzamensesio kaj kun prezento de provleciono aliĝis 13 personoj. Do, entute 23 eventuale ontaj diplomitaj instruistoj. La Estraro sekvas ilian progreson kaj tre esperas al ilia plena sukceso.

En Afriko, en Benino, samtempe kaj samloke kiel EIT sesio de **KER-ekzamenoj** okazos unuafoje. ILEI kaj la organizantoj, tio estas la NGO “Scio Sen Bariloj”, klopodas havi tie iun gravulon kiel altan protektanton kaj rilatos kun diversaj amaskomunikiloj. Por la sesio estos proponata la nivelo B2.

ILEI konstatas, ke la stoko de la *Manlibro pri Instruado de Esperanto*, tria eldono 2009, elĉerpiĝis. Konsekvence la kontaktoj por verki novan eldonon survojas. Novaj aŭtoroj estas bezonataj por prezenti la nuntempajn eblojn lerni nian lingvon.

Jam de kelkaj jaroj ILEI kreis apartan regularon por ekzameni kaj taksi la lingvajn kapablojn de **blinduloj** per adekvata maniero. Sesio okazos kadre de UK. Anoncojn de kandidatoj bv., sendi ĝis la 15-a de junio al [ilei.prezidanto@gmail.com](mailto:ilei.prezidanto@gmail.com).

## **Kongresoj**

### **La 51-a ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio**

#### **La emblemkonkurso.**

Januare la Estraro sukcese alvokis kaj kreis internacian ĵurion por taksi la senditajn emblemproponojn. La ĵurion eniris fakuloj el Brazilo, Rusio, Francio, Serbio kaj Hispanio.

La ĵurio efektive kaj diligente laboris ĝis la fino de januaro kaj sendis siajn taksojn. Poste februare la Estraro pridiskutis ĉiujn taksojn kaj elektis inter ili la kandidatojn por premioj. Fina diskuto kaj voĉdono okazis dum la skajpa Estrarkunsido la 3-an de marto. Kiel emblemo de la 51-a ILEI-kongreso en Madrido en 2018 estis elektita la laboraĵo de Eugenio Hansen, komencanta Esperantisto, brazilano. Gratulojn al li!

Marte, laŭ la peto de la gajninto, kiu ne povas mem partopreni ILEI-kongreson-2018 en Madrido, la Estraro decidis permesi, ke li ĝiru sian premion (aliĝon al la kongreso) al persono nomumita de lia landa asocio.

#### **Informado**

Fine de januaro en la retejo de la kongreso <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso> estis publikigita la alvoko pri la ILEI-simpozio dum la kongreso. ILEI organizas la simpozion kunlabore kun la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED – Universidad Nacional de Educación a Distancia), UEA kaj Hispana Esperanto-Federacio (HEF). Ĝi okazos en ejoj de UNED la 26-an kaj 27-an de julio kaj estas malferma por esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj kaj interesatoj, ebligante ilian dialogon pri temoj de komuna intereso, observataj el diversaj vidpunktoj. La laborlingvoj estos Esperanto kaj la hispana. Poste la sama alvoko estis disvastigita ĉe la paĝaro [ilei.info](http://ilei.info).

## **Servoj**

Januare LKK kune kun la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović detale diskutis kondiĉojn kaj prezojn por loĝado kaj manĝado dum la 51-a ILEI-kongreso.

Februare, laŭ la iniciato de Radojica, estis dissendita kun la februara numero de la Revuo de UEA (*RE*) presita aliĝilo por ILEI-kongreso en Madrido

Februare LKK anoncis, ke estas preskaŭ pretaj la kondiĉoj por mendoj de la partoprenontoj. Dum la skajpa kunsido la 2018.03.03 la Estraro decidis pri kondiĉoj por subvencioj por partoprenontoj-aktivuloj el Afriko. ILEI pagos la kongreskotizon kaj rabatos loĝadon kaj manĝadon je 150 EUR.

Daŭras varba kampanjo por la kongreso. Laŭ la hodiaŭa stato aliĝis al la 51-kongreso entute jam 150 partoprenontoj. Absoluta rekordo por ILEI por la unua aliĝperiodo!

Marte la Prezidantino Mireille Grosjean kaj la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović kun LKK komencis zorgi pri inviteletoj, kiuj estas necesaj dokumentoj por akiro de vizo por certaj partoprenontoj en Madrido.

Ĉe la retejo <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/360> eblas vidi jam fotojn de la kongresejoj, de la ĉambroj kaj aliaj spacoj.

Marte ĉe [ilei.info](http://ilei.info) estis aperigita ĉiu aktuala informo pri kongresaj servoj. Same la informo estas disvastigita tra diversaj kanaloj, inkluzive sociajn retojn (vidu ekz, <https://www.facebook.com/madridakongreso>, kaj aliajn).

## **Venontaj kongresoj**

Jam venas inviteletoj por la estontaj ILEI-kongresoj en proksimaj tri jaroj. Unu el la proponoj estis traktita dum la skajpa estrarkunsido la 2018.03.03.

## **Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj**

Daŭras kolektado de jarraportoj de sekcioj fare de la viscektariino Elena Nadikova. Meze de aprilo haveblas raportoj el 14 sekcioj: 2 el Afriko (Senegalo kaj Tanzanio), 2 el Ameriko (Amerika asocio, Brazilo), 9 el Eŭropo (Albanio, Rumanio, Nederlando, Svislando, Danio, Belgio, Hungario, Finnlando, Ukrainio), 1 el Azio (Ĉinio). La Estraro tre dankas la sekciestrojn, kiuj jam sendis siajn raportojn kaj petas aliajn sekciojn same informi pri sia agado por Esperanto.

Januare, dum la tutlanda kongreso, okazis elekto de nova estraro de la ĉina sekcio. Nun ĝin estras S-ro WEI Yubin "Jado". La Estraro de ILEI aprobis tiun decidon kaj esperas al novan sukcesan kunlaboron!

Fama aktivulino el Italio, Michela Lipari, proponis bonan iniciaton kolekti informon pri esperantistoj, kiuj instruas sian nacian lingvon kaj/aŭ Esperanton al rifuĝintoj. Tiu listo povos lanĉi interesan pedagogian interŝanĝon de diversaj spertoj en tiu kampo inter esperantistoj. La iniciato estis apogita de la Prezidanto Mireille Grosjean, kiu sendis alvokon tra kanaloj de ILEI.

## **Koleghelpa kaso**

Januare la Prezidantino ĝustigis la datumojn de la KhK por 2018. Dum la skajpa kunsido 2018.03.03 de la Estraro la listo estis voĉdonita kaj aprobita. Donacoj por plenigi tiun kason estas ĉiam bonvenaj

### **Internacia Pedagogia Revuo (IPR) Juna Amiko (JA)**

Februare venis peto el Pollando, por ke *Juna Amiko* kiel produkto de ILEI iĝu patrono de la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj kantoj en Vroclavo, organizita de konstanta kontribuanto de JA Małgosia Komarnicka, samtempe la Prezidantino de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado en Vroclavo. Post diskuto la Estraro voĉdonis kaj aprobis tiun iniciaton. La festivalo okazos la 19-20-an de majo kaj danke al ĝi informo pri Esperanto kaj JA same estos diskonigita tra polaj amaskomunikiloj.

Dum la skajpa estrarkunsido 2018.03.03 estis decidite, ke Stano Marček ricevu rekompenson pro sia aldona laboro por IPR, ĉar IPR estas nun presata kaj dissendata el lia urbo Martin.

En marto restartis diskuto pri JA. La Estraro jam intencis okazigi la esploron pri uzado de la revuaj materialoj en instruado de Esperanto. Al tiu temo aldoniĝis demandoj pri celgrupo de la revuo, ĝia kvalito, kreskigo de la abonantaro, efiko de la nova “supera” membreco. Meze de marto la Prezidantino dissendis la alvokon al la sekciestroj, reprezentantoj kaj aliaj koncernaj personoj, kun peto, inkluzive, pri financa apogo de la revuo. Estas planata komuna cerbumado kaj enketado dum la ILEI-kongreso en Madrido. Dum la reta voĉdono de la Komitato pri la buĝeto-2018 ankaŭ estis proponita diskuto pri la plua sorto de niaj du revuoj.

Marte venis bona novaĵo, ke danke al donacoj de niaj koreaj kaj finnaj gekolegoj la revuo estos plene kolora dum la jaro 2018. Gratulojn al “juvelo de ILEI” kaj korajn dankojn al niaj samideanoj!

### **Kunlaboro kun UEA**

Komenciĝis la preparado al Tago de Lernado dum UK en Lisbono. Marte la Estraro diskutis temon por ĝi. Jen rezulto: “Aliro al kulturoj pere de la lingvo ESPERANTO”.

### **Kontaktoj kun aliaj enmovadaj institucioj**

Laŭ la interkonsento kun la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) februare la Prezidantino Mireille Grosjean petis du redaktorojn Jozefo Nemeth kaj Stano Marček produkti la unuan numeron de IPR kaj JA en taŭga formato por blinduloj, t.e.sen iuj foto, desegnaĵo, grafikaĵo, en formato pdf, nur tekstojn. Tio estos la dua paŝo por ebligi al LIBE-anoj legadon de du revuoj de ILEI. La afero survojas.

### **Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj**

Januare-februare daŭris traktado pri interkonsento inter UEA, ILEI kaj **Zaozhuang-a Universitato** en Ĉinio pri enhavo de tiu dokumento.

Fine de marto estis interkonsentite inter la estraroj de UEA, ILEI kaj Zaozhuang-a Universitato, ke definitiva versio de la kontrakto estos subskribita deflanke de koncernaj personoj dum UK en Lisbono dum la Tago de Lernado.

Novembre la Prezidantino skribis leteron al la nova Ĝenerala direktorino de **UNESKO** s-ino Audrey Azoulay kun alvoko memori pri Esperanto kaj laŭeble apogi ĝin. Meze de februaro venis respondo de s-ino Audrey Azoulay, en kiu ŝi dankas Mireille Grosjean pro la subteno al Unesko kaj aktivado por Esperanto kiel lingvo, kiu “iras trans la homajn limojn, kunligiĝas kun la streboj de UNESKO en la kampo de interkultura alproksimiĝo”.

Januare ILEI komencis kunlaboron kun la asocio “Poésie en liberté” enkadre de la programo “**POEZIO TUT'LIBERA**”. Temas pri la internacia konkurso de franc-lingva poezio tra interreto, publikigita en la “Bulletin officiel de l' Education nationale” (oficiala bulteno de la franca ministerio pri edukado). En la organizado partoprenas multaj kunagantoj, publikaj institucioj, privataj entreprenoj. La konkurso estas malfermata al ĉiuj junuloj, inter 15- kaj 25-jaraĝaj. En 2018 la unuan fojon estos akceptataj poemoj en Esperanto.

Marte Mireille Grosjean vizitis Esperanto-urbon en Herzberg am Harz kaj partoprenis en la kunsido de la **Fondaĵo Esperanto-Stadt Herzberg** kiel reprezentanto de ILEI en la fonduma konsilio.

### **Reala vivo**

Nia estrarano Radojica Petrovic estis malsana dum pluraj semajnoj. Forpaso okazis en la familio de Elena Nadikova. Malsano trafas familimembron de Gong Xiaofeng “Arko”. Do nia estraro klopodadas fari siajn taskojn foje en malfacilaj cirkonstancoj.

### **Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn!

Vicsekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

04-15

2018-